

Interlingvistiko en la instru-sciencoj, temo de la internacia konferenco organizita de la Instituto de Pedagogio kaj Kibernetiko en Paderborn (24-28.11.1976),

3-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 690, 1976.12.29 & 31 & 1977.01.01

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la Internacia Konferenco pri Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo pluraj prelegoj estis ege interesaj por pedagogoj. Tre resume ni hodiaŭ raportos pri tiu aspekto de la renkontiĝo okazinta en Paderborn en Instituto pri Kibernetika Pedagogio fine de la monato novembro.

A.- S-ro Hermann Behrmann, sub la titolo Lingvo-orientiĝa instruado laŭ la Paderborna modelo, kun prezentado de aŭd-vida program-leciono alportis interesajn sciigojn pri la pedagogia aspekto de la eksperimenta instruado de esperanto nuntempe disvolviĝanta en Paderborn. Tiu ĉi prelego okazis en la klasejo mem, kie esperanto estas permaŝine instruata.

Cl.- Temas fakte pri malheligita klasĉambro, kie la infanoj sidas vidalvide de ekrano, kie projekcie bildon post bildo estas proponitaj la programeroj de aŭd-vida kurso.

A.- Tiu ĉi ekrano havas precizan celon : pretigi la gelernantojn al la lernado de fremdaj lingvoj kiel la latina aŭ la angla. Esperanto estas elektita kiel provizora lingvo pro sia facileco kaj reguleco. La gelernantoj sekvas tiun ĉi elekteblan instruadon dum la 3-a kaj 4-a jaroj de la elementa lernejo, ili estas dek- kaj dekunu-jaraj. En la horaro troviĝas po du horoj sinsekvaj semajne, kio ne estas tre favora. La instruado finiĝas kun klarigoj pri la lernotaj lingvoj kaj kun esperantlingva instruado pri la funkciado de komputero.

Cl.- Instituto pri Kibernetika Pedagogio mezuras la rezultojn de tiu eksperimento per testoj. Doktoro Helmar Frank esperas povi testi la rezultojn de aliaj instru-eksperimentoj bazitaj sur aliaj programoj.

A.- Pluraj konferencanoj ĉeestis lecionon, inter ili mia kolego sinjoro Olivier Tzaut, kiu gvidas en Svislando la aktivecon de la kampanjo Esperanto en la Lernejojn. Tiuj observantoj miris pri kelkaj aspektoj de la paderborna eksperimento, unue ke la instruadon gvidas nesperta esperantistino, due pri la monotoneco de la instruado, kiu tre verŝajne estas la konsekvenco de la programado kaj de la uzo de respondmaŝino. Por respondi la gelernantoj devas elekti inter kvar eblaj respondoj. Al ĉiu respondo korespondas premilo sur aparato. Al ĝusta respondo respondas verda lumsignalo. Al falsa respondo ruĝa lumo. La gelernantoj ne povas antaŭeniri laŭ propra laborritmo, ĉar la lumbilda projekciado estas kolektiva ; trie la observantoj konstatis, ke la parol-modelo estas bazita sur ege germaneca prononcado de esperanto, kio estus evitinda kaj facile evitebla. Kaj la parolritmo estas lerneja, io nepre evitinda en la aŭd-vida instruado. Neniu observanto eliris la lecionon kun entuziasmo.

Cl.- Mi persone antaŭ ĉio kritikas la miksadon de aŭd-vida kaj skriba instruado. La avantaĝo de la aŭd-vida instruado estas ĝuste la forigo de la lern-inhibicioj, kiujn kaŭzas la skribita instruado. La paderborna modelo ne konsideris tiun ĉi psikolingvistikan aspekton de la demando.

A.- La observantoj konstatis, ke la plimulto de la gelernantoj ne kapablas atente sekvi la instruadon dum la tuta leciono. Ni forte dubas, ke aŭtomata instruado konvenas al 10-jaraj infanoj dum lern-periodo de po du horoj semajne. Laŭ niaj spertoj la aŭd-vida instruado estas

efika por infanoj kaj por plenkreskuloj, nur se la instrutempo pofoja ne superas kvaronan horon. Poste devas sekvi alispeca instruado, kie moviĝado estas ebla kaj kie plenlumo revenas.

Cl.- Povas esti, ke la paderborna modelo konvenas al lernejoj, kiuj deziras enkonduki la instruadon de esperanto sen havi instrukapablan instruiston. Tamen ĝi devus renoviĝi por adaptiĝi al la individua instruado, donante al ĉiuj la eblon antaŭeniri laŭ propra lernritmo, kio fakte efektiviĝas en la lingvolaboratoria instruado. Por la kolektiva instruado la uzo de travidebla ekrano permesus labori en multe pli hela klasĉambro, kio ankaŭ estas konsiderenda.

A.- Pedagogio estas plurdimensia arto, tial estas malfacile redukti la tutan instruadon de fako al nur unudimensia didaktiko. Kaj precipe en la asimilado de lingvo la plurdimensieco estas gravega. Lingvo ne nur asimiliĝas per la cerbo tra la oreloj, okuloj kaj per korusa ripetado kaj fingrumado sur butonoj. Lingvo ankaŭ asimiliĝas tra gestaro, ĉar la memoro bezonas muskolan fundamenton. Lingvo ankaŭ asimiliĝas per paralela ripetado de samaj akirotaj refleksoj en la kadro de ŝanĝiĝantaj lernaktivecoj : kantado, aktorado, ludado kaj konkursado, ktp. Ni forte timas, ke instruado nur maŝina kontrolata de instruisto nur balbutanta la lingvon neniam ampleksos ĉiujn tiujn dimensiojn. Tial ni dubas pri ĝia estonteco.

Cl.- Tamen la paderborna eksperimento estas ege interesa, ĉar tutcerte la aŭtomata instruado povus multon alporti liberigante la instruanton de la ripetadaj taskoj profite al pli nobla laboro. Estus bone, ke en Paderborn oni paralele efektivigu du eksperimentojn, kun klasoj nur lernantaj esperanton permaŝine, kaj kun klasoj, kie tiu ĉi maŝina instruado estas nura parto de la instruprogramo. La komparo de la rezultoj estus tutcerte ege instrua.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!